

& Juĝu prudente!:

< Ripete 29 sed rekante 24 el 43 batoj por strofo, entute 344 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (Verdkata testamento, 1929). Baladigis Martin Strid (2016) per samaj melodio kaj rekantaĵo kiel por Bonfara Influo de la Alkoholo.>

(#Melodio:

<:43> (o;So /doododo dododo SooSoSo SooSo;So LaaLaLa reeredo TiiLaLa So So;So doododo dododo SooSoSo SooSo;So LaaLaLa reeredo TiiLaLa So So;h

(#Rekantaĵe: miimimi mire dooTiTi do; reerere reedodo TiLa Ti; doododo miidodo LaaLaLa doLa SooSoSo doododo TiiTiTi do; doododo miidodo LaaLaLa doLa SooSoSo doodore miirere do;

)×8)+

(&Strofoj:

'1 Ŝi /hejmenrevenis kun granda skatolo, ; Kun granda skatolo ŝi hejmenrevenis ; Kaj jam – laŭ klasika eterna edz-rola – ; Pagotan fakturon en mano mi tenis.

(×:; **Kantu fiere, kantu en ĉen! ; Paŝu surtere, ĝin draŝu jen! (; Kune en rondo ne zorgu pri mondo, tondru la ĝojo en danca la hal'!)**×2)

'2 "Ne grumblu!" ŝi diris per voĉo anĝela,; Per voĉo anĝela "Ne grumblu!" ŝi diris, ; "Rigardu, mi estos centfoje pli bela ; En tiu ĉi robo," – kaj ŝi sin admiris.

'3 Mi juĝis severe pro nigra humoro, ; Pro nigra humoro mi juĝis severe: ; "Sendube vin mokis kanajla tajloro, Vi tiavestite aspektas ansere;

'4 Jen sub la femurojn deglitas talio, ; Deglitas talio jen sub la femurojn, ; Kaj

fuŝe desegnas la dorsa linio ; Sur via dorsparto kubistajn konturojn!"

'5 Pli ol mi imagis ŝi restis silenta, Ŝi restis silenta pli ol mi imagis ; Kaj mi nur memoras, ke malgraŭkonsenta; Finfine devige la robon... mi pagis.

'6 Mi ĉion komprenis pri l' ŝajna mistero, ; Pri l' ŝajna mistero mi ĉion komprenis ; Nur kiam ok tagojn post tiu vespero ; Kun granda skatolo ŝi hejmenrevenis!

'7 Karese ŝi petis "Ne grumblu, karulo," ; "Ne grumblu, karulo", karese ŝi petis, ; "L' alia ne plaĉis al via okulo ; Kaj tial obee mi novan aĉetis, –

'8 La mian staturon ĝi muldas mir-mire, ; Ĝi muldas mir-mire la mian staturon, ; Bonvolu konstati..." kaj stulte sendire ; Mi tenis en mano jam novan fakturon!